

& Printempa sorĉo:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 333 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kaj rekantaĵo kiel por &Konfeso.>

(#Melodio:

<:37> (

a;do /dodo dore doTi La;So dodo dore mimi mimi; miifafa soso somi mi;re dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 Flir/tanta eta papili' ; Flugadas super kampa vojo. ; Ho, en lazur' flugpendu nur! ; Mi nun forgesas pri l' malĝojo

(×:; **Zorgojn mi foje forgesas ; Mi pri kredo ne promesas ; kaj malgajon venkis mi ; Tion mi ĝoje konfesas.**)

'2 Kaj tuta la flugila polv' ; Pentrinta mian infanmanon ; Surpluvas min, kaj al la sin' ; Ĝi portas post doloro sanon.

'3 Kun kis' tumultas al la kor' ; De l' infanaĝo mil memoroj, ; Nenie pent', malĝoja sent', ; Kruela aro de l' doloroj.

'4 Mi serĉas: kien estas for ; Amdorn': malnova dolorilo...? ; Jen, en la kor' arĝentsonor': ; Ĝojŝafidet' kun sonorilo.

'5 Ho ora sun', ho silkĉiel'! ; Facila nub' el purarĝento! ; Printemp' sen lim'! El la anim' ; Rifuĝas ĉia splena sento.

'6 La kamp', sonanta ondfein', ; Ornamis buklojn nun per floroj ; Ŝi kantas jen, sin banas en ; Rivero dolĉa de l' odoroj.

'7 Ho, kia tril' de l' birda ar'! ; Sur arboj dolĉa floro-ĉarmo! ; Kun laŭta ĝem' ĉu do mi mem ; Min lavis per maldolĉa larmo?

'8 Ho, vi mensogis al mi, kor', ; Ke estas tuta viv' sufera, ; Ĝojkriu nun, eksciuj nun ; Ke estis via vort' malvera.

'9 Plezuro kia estas nun ; Doloron per kalkano jugi! ; Ho, kia ĝu': sub brila blu' ; Sur kamp' ekkuri... suprenflugi...)